

# La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 31 – Aprilo, Majo, Junio 1995.

ISSN 0986 - 1181



Ĉefartikolo

## Rizo kaj maizo

Juna profesoro promenis borde de *Yang-ce*. Li meditis pri la diferencoj de lingvoj kaj ties influoj sur la internacian idiomon.

En la Ĉina tri malsamaj vortoj nomas respektive ne nur la rizoplanton, sed ankaŭ ties grajnoj kaj ankoraŭ la samajn grajnoj pretigitajn por manĝo! La tri vortoj estas sen rilato inter si krom la scio, kiun ĉiu havas pri ili en la tuta lando. Sed en la internacia, kiu fontas ĉefe el la Indo-Eŭropaj lingvoj la situacio malsamas: laŭ PIV la vorto *rizo* respondas same al la tri Ĉinaj vortoj kaj nomas sendistinge la *planton*, la *grajnon*, kaj la *manĝaĵon*!

Por ke Esperanto vere tutmondiĝu necesos, ke PIV estu pli preciza kaj ke por ĉiu vorto oni agu jene: ĝi indiku ĉe *rizo* la ĝustajn derivaĵojn, ĉe ilia loko; do ekzemple *rizujo*, *rizero* kaj *rizajo*

Tiele ne malprave vojis la pensoj borde de *Yang-ce*.

Multe pli frue borde de alfluanto de *Garonne* juna studento promenis kun siaj onklo kaj kuzineto, sermante <sup>1)</sup> pri io kaj nenio . . . Alveninte ĉe kampo kun plantoj, kies tigoj nete preterpasis la alton de homo, li admiris la longajn lancoformajn foliojn, el kiuj surprizige ekvidiĝis grajn-amasoj, densaj kaj oraj. Andreo veninta gaste ĉe sia onklo el 800 kilometroj pli norde neniam vidis tian planton! La onklo lin ĉuis: "Kio 'stas tio?"

Andreo mutis antaŭ la onklo kaj la kuzineto! Certe cerealo, sed vanis ĉia cerbumado . . . Post momento, ne plu povante elteni, ekpepis la kuzineto: "*Maizo!*" Reago tuja! Ekflamis la vangeto, hontis kaj ekploris la kuzineto, konsterniĝis Andreo, patre suverenis kaj instruistis la onklo!

Jarojn pli malfrue Andreo ankaŭ meditas. Ĉio okazus same, se Esperanto estus uzata! Ne nur la planton, ĝian grenon kaj la pretigitan grenon la kuzineto

(Fino sur p. 2)



(Fino de p. 1)

montrus, ekpepante la vorton *maizo*, sed ankaŭ la maizokampon kaj eble ĉion rilatan al tiu *aĵo*. Ĝi ne "nomus" ĉion ĉi per ĉiodira vorto. Ĝi nur praktike "indikus" per la esenca ŝlosil-vorto . . .

Sed la komunuma <sup>2)</sup> instruisto dokte povus precizigi sian penson : *maizokampo* aŭ *maizejo*, *maizoplanto* aŭ eble *maiziero* <sup>3)</sup>, *maizobovlo* aŭ *maizujo*, *maizograjno* aŭ *maizero*, *maizaĵo* aŭ *maizokuko*, *maizoflokoj*, *maizokremo*, kaj la *polento* el la Itala kulinara arto!

La lingvo povas senfine precizigi. Ĝi povas ankaŭ draste simpligi. Tio estas afero ne nur de vortaro. Ekzistas ne nur vortfarado sed ankaŭ dinamiko de la vortfarado <sup>4)</sup> : la vortoj elvenas sur la langon de ĉiu!

D-ro André Albault

1) **Sermo** : Zamenhofa vorto signifanta "familiara interparolo sen aparta celo" (el Latino *sermo, onis*).

2) En ties Fundamenta senco de plej eta administra teritorio.

3) **-iero** : pli bona formo de la Zamenhofa sufikso *-jero* por nomi la plantojn laŭ ilia esenca elemento, floro, frukto, ekstrakto. (*Vojaĝo tra la landoj*, p. 15).

4) A. Albault : *Eseo pri la dinamiko de la Esperanta vortfarado*. En :

---

## Jean THIERRY (1924-1995)

Adiaŭ, mia kara Jean!

Niaj vojoj proksimiĝis, kiam en la 50-aj jaroj ci vizitis kunvenon anoncitan en la koridoroj de Sorbono. Fine de tiu magistra eksponaĵo pri la grammatiko de nia internacia lingvo ci konatiĝis kun la oratoro, Raymond SCHWARTZ, kiu enkondukis cin rekte en la *Kabareton de la tri Koboldoj*, kiel li nomis ĝin. Ci estis vizaĝ-al-vizaĝe de iu *Majstro de l'Gaja Scio*, kiel ni dirus en Tuluzo. Ci estis iniciata al la enorma rido de Rabelais.

Tio kondukis cin fariĝi aŭtoro de iuj skeĉoj kaj teatraĵoj, el kiuj unu el la lastaj ĵus estis prezentita dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Paris antaŭ kelkaj tagoj. Ci deziris kunigi ilin libroforme.

Cia aktivado montriĝis multe pli vasta, dividita inter grammatiko, tradukado kaj komponado, aŭ ankoraŭ la ekregado super la destino de nia Franca Unio por Esperanto aŭ de la Franca Esperanto-Instituto, en kiu ci iĝis prezidanto por multaj jaroj.

Nu, Jean, necesas diri vorton pri nia konstanta kunlaborado de tiuj ĉi naŭ lastaj jaroj, dum kiuj, ĉekape de la Esperanto-Akademio, ni laboris por la bono de la internacia lingvo.


Unuvorte! Tutan vivon vaste dediĉitan al Esperanto!

Ja tie cialaj homaj kvalitoj evidentiĝis kaj elpoviĝis. Ci ja akiris nociojn pri juro post lernado en la Liceo "Henriko la Kvara", sed cialaj kunnaskitaj kvalitoj de diplomato, ĉe homo bona, lojala kaj modesta, kaj kies moralan kaj intelektan rekitecon neniu kontestas, estis de granda helpo pli ol unu fojon en nia internacia institucio. Cia nobleco kaj cia disponebleco, admirataj de cialaj intimaj amikoj, tiel same kiel cia vasta kulturo, faris el ci perfektan honestulon, tiel same laŭ la intelekta, kiel laŭ la morala vidpunkto.

Ni perdas en ci pli ol sindiĉan kunlaboranton, ni perdas en ci realan Amikon, veran Homon, fraton! Fratoni, pri kiu ni daŭre memoros!

Ĉirkaŭita de cia familio, de cialaj amikoj, ni diras al ci :

Adiaŭ, mia kara Jean!



(Elfrancigita apudĉerka parolado)

D-ro André ALBAULT

---

Jean THIERRY mortis en Parizo ĉe eliro de Esperanta kunveno. La enteriga ceremonio okazis la 22-an de Junio. Ĉeestis pluraj Akademianoj kaj multaj Esperantistoj el Parizo kaj la regiono.

# *La letero de l' Akademio de Esperanto*

N-ro 31 – Aprilo, Majo, Junio 1995.

ISSN 0986 - 1181

**MANKAS PAĜOJ 3, 4, 5 kaj 6**

# Rimarkoj pri matematiko

Letero de L. E. A. CHARRIERE

Mi ĵus ricevis vian bultenon, *La Letero de l' Akademio*, kaj dankas vin. Matematiko multe interesas min, do ĵen kelkaj rimarkoj pri la letero de Fernand BOYET. (Bedaŭrinde mi ne legis la proponojn de Georgo Kamaço).

1) Se mi donas al vi la du nombrojn 2 kaj 3 kaj proponas, ke vi adiciu ilin, la intenco donas sumon  $2 + 3$ . Se mi demandas, kiom ĝi faras, la respondo estas 5. Necesis plia mensa operacio. 5 estas la rezulto de kalkulo.

Se mi donas al vi  $a$  kaj  $b$ , vi ne povos kalkuli, tamen la sumo  $a + b$  ekzistas.

Do, necesas distingi la intencon (operacii per du nombroj) de la kalkuleblo (mekanika kalkulado). Ni povas diri *2 plus 3 faras 2 + 3 kaj 2 plus 3 egalas 5*.

2) Divido estas la inversa operacio de multipliko, sed

—> necesas konsideri tri tipojn de kvantoj : la materiajn (ekzemple 7 *pomoj*), la konkretajn (ekzemple  $2 m^2$ ), kaj la idealajn (la matematikaj nombroj);

—> necesas konsideri du tipojn de dividoj : la divido = raporto kaj la divido = malkunigo.

Ekzemple : trioble 5 aĵoj faras 15 aĵojn. Se vi solvas  $15 \text{ aĵoj} = ? * 5 \text{ aĵoj}$ ,

$15 \text{ aĵoj} : 5 \text{ aĵoj} = 3$ -foje estas la divido = raporto.

$15 \text{ aĵoj} : 3 = 5 \text{ aĵoj}$  estas la divido = malkunigo, tamen tio konsistas el la samaj kalkuloj : la du aspektojn de la divido enhavas la divido de nombroj (idealaj, abstraktaj).

—> la kvociento ekzistas aŭ ne. Ni ne povas paroli pri *ekzakta divido*.

La kvociento  $22 : 7$  ne ekzistas, se ni parolas pri entjeroj. Sed en la reelaro, la kvociento  $22 : 7$  ekzistas kaj 3,14 estas unu el la proksimumoj de tiu kvociento. (22 estas dividebla per 7).

—> necesas rimarki la diferencon inter  $15 = 5 * 3$  kaj  $19 = 3 * 5 + 4$

Al la unua respondas la divido  $15 : 3 = 5$ . Tio estas operacio, en kiu la bildo de du nombroj (15 kaj 5) estas ununura (3). Ne eblas kun la dua :  $19 : 5 = 3$ , restas 4; la bildoj de la du nombroj (19 kaj 5) estas du (3 kaj 4).

Rimarku la nesimetrian rolon de 3 kaj 5 en la dua egalaĵo. Alia ekzemplo :  $19 : 3 = 5$ , restas 4 ne validas, ĉar  $4 > 3$ . La dua operacio estas nomata Eŭklida divido. 15 estas divizebla per 3, sed 19 ne estas divizebla per 5; tamen 19 estas dividebla per 5 :  $19 : 5 = 3,8$ .

3) Resume, rigardu kiel ni povas legi  $5/4$  :

—> kiel kvocienton : 5 super 4, la rezulto de 5 dividita per 4, skribita  $5 : 4$  aŭ  $5/4$ .

Se ni havas 5 pomojn kaj 4 infanojn : ni donas po unu pomon al ĉiu infano, kaj distranĉas la lastan al 4 kvaronoj. Ni faras ion (ni kalkulas), kaj  $5/4$  estas la fracia esprimo.

Se ni havas 5 dolarojn kaj 4 infanojn : ni donas po unu dolaron al ĉiu infano, sed la lasta estas jam antaŭdividita al cent partoj.

Same, se en la decimala nombrosistemo, la unuoj estas tranĉeblaj al 10, 100, 1000, . . . pro tio estas la decimala esprimo  $5/4 = 1,25$ .

La kvociento havas du esprimojn, la frakcian kaj la decimalan.

—→ kiel raporton : en la raporto de 5 al 4.

Ekzemple en ortogramo, la longo kaj la larĝo estas en la raporto de 5 al 4. Kaj la larĝo kaj la longo estas en la raporto de 4 al 5.

Se ni skribas  $L = 5/4 * l$ , ni privilegias la longon (la larĝo estas dispone je la longo.  $5/4$  nun estas frakcia operatoro).

Fakte,  $5/4$  estas  $5/4$  de  $l$ . Tiu rimarko enkondukas la sekvanton :

—→ kiel frakcion : 5 kvaronoj, la kvarono estas la nova unuo.

Mi esperas, ke mi ne ŝtelis tro da loko el *La Letero*, nek tro da tempo al la legantoj.

**PS.** Mi deziras traduki aŭ tradukigi kelkajn paĝojn por geometria programaro. Kiujn matematikan kaj komputoran vortarojn kompetenta leganto konsilas al mi? [L. E. A. CHARRIERE, F 74140 MASSONGY, Francio]

### "La Amikoj de l' Akademio" :

Ni intencas likvidi tiun asocion kaj por tio ni organizos specialan kunvenon en Oktobro. Kiuj deziras esti kunvokitaj bonvole avertu nin!

Koncerne la Akademion mem validas nur

la adreso de la nuna Prezidanto de l' Akademio : Dr-o André ALBAULT, 21, rue de Verfeil, F 31200 TOULOUSE. Sed lia tempo estas tre limigita. Li respondos nur pri gravaj aferoj; ĉiuokaze ne pri lingvaj opinioj. Tion faros la nova Prezidanto : baldaŭ okazos elektoj.

**LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO.** Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — Redaktoro : Jean THIERRY. — Direktoro de la publikaĵo : André BOURDEAUX, 91, rue de la Chapelle, E 184, 75018 PARIS. — Presejo : COCONNIER, 72300 SABLÉ. — C.P.P. : n-ro 6971. — Prezo : 1 n-ro : 40 FRE — Jara abono : 120 FRE — Pagebla : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝtĉeka : 735 27 B Paris. — UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

### Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, L.P.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Benelukso : KARILJONO. Doornstraat 22, 2610 WILRIJK, akceptas diversajn kreditkartojn. La prezo estas 960 BEF.

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : ScS Ed Jockey Club — Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Postfach 100447, D 41704 Viersen, Germanio. — Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DE Meksiko.

Rusio : D-ro Sergey N. KUZNETSOV, Semashko 1/12 RUS 103009 MOSKVO.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94712, Usono (23 \$).